OFICIALA ORGANO DE S.A.T.

SAT-ANOJ KUTIMIĜU AL EKSTERNACIA SENT-, PENS-, KAJ AGADKAPABLO! LANTI

# Sennaciulo




Sennaciulo, julio-aŭgusto 2008, n° 07/08 (1237/8), MENSUEL/MONATA, ISSN 1163.0442, prezo 5 €

www.satesperanto.org
Sennacieca Asocio Tutmonda -"kleriga laborista asocio"

## Ĵus aperis ĉe :

# Eldona Fako Kooperativa de SAT





Ĉi tiu libreto prezentas ĉiujn tekstojn, kiuj konsistigis la debaton pri Esperanto en la paĝoj de la italaj socialismaj gazetoj en la jaro 1918.

Inter la debatantoj la plej influa kaj elstara estis Antonio Gramsci, kontraŭulo de Esperanto, kies ideoj tiuteme grave influis la tutan socialisman movadon, eĉ ekster Italio.

Sekvas tri malsamstilaj kontribuoj de kamaradoj, kiuj diversmaniere kaj ne ĉiam interkonsente analizas la debaton kaj ĝian pluan aktualecon.

La tuto celas disponigi al la legantoj dokumentan materialon, kiun ili povos utiligi kadre de pliaj tiutemaj debatoj.

**Prezo: 5 €**




Ĉi tiu libro, kiu multon ŝuldas al la Amikaro de la Pariza Komunumo de 1871, prezentas historian skizon pri la unua el la plej riĉaj epizodoj de la laborista historio.

Sekvas diversaj kontribuoj pri kelkaj apartaj roluloj, kiuj ebligas iom pliprofundigi kelkajn el la aluditaj aspektoj.

La tuto celas disponigi bazan klerigan materialon pri la temo, kaj espereble spronos al verkado de samtipaj libretoj pri aliaj gravaj okazaĵoj, kies studado plu havas praktikan utilon.

**Prezo 5 €**



Karaj kamaradoj,
per tiu ĉi numero ni anoncas al la legantaro, ke Sennaciulo aperos por la venontaj monatoj kiel dumonata gazeto kaj tiel rehavos regulecon. Dum la pasintjara kongreso en Belgrado (Serbio) oni decidis provi ambaŭ sistemojn (ĉiumonatecon kaj dumonatecon) por kontroli la reagojn kaj de la redakta skipo kaj de la legantoj. Oni ĵus aprobis en la ĉi-jara kongreso en Kazanlak (Bulgario), ke oni daŭrigos laŭ la dumonata sistemo.

Tio ne signifos, ke la legantoj perdos ricevaĵon (nome duonon de la legotaĵo), sed male ĉiu ricevos same, ĉar ĉiu numero estos duobla. Nur la ritmo estos diferenca. Tio helpos la novan teamon kaj la novan enpaĝigonton fari sian laboron, ĝis nun faratan de Kreŝo Barkoviĉ. La manko, ke dum pli ol unu monato oni nenion ricevos, estu kompensata per nova sistemo, ke ĉiu povos ricevi ĉiumonatan retan leteron kun informoj pri la asocio. Tiu, kiu ne havas retaliron, povos peti de alia kamarado printaĵon de tiu letero kaj, se ne estas tia en la sama urbo, oni povas peti al kamarado de alia loko, ke tiu sendu ĝin.

Tiu ĉi numero dediĉas sian dosieron al la temo de separatismoj aŭ naciaj apartiĝemoj, kio certe jam iam interesis la SAT-anojn, kiuj partoprenas la SAT-diskutejon per reto. Nun oni klopodas malfermi la ventumilojn de tutmondaj kazoj, kiuj priokupas la popolojn kaj la SAT-anojn mem. Kiel ĉiam, ni atendas kaj esperas reagojn, ĉar la temo ne estos fermita; male, ĉiu temo estu nur sprono al daŭrigo pri novaj klopodoj kleriĝi kaj klerigi la SAT-anaron. Krome, dum oni preparis tiujn dosierojn kaj numeron, eksplodis milito en Kartvelio, ligita ĉefe al separatisma problemaro; ni intence ne pritraktis tiun temon, ĉar ĝi ankoraŭ daŭras kaj motivos novajn tekstojn de kontribuontoj.

La venonta dosiero temos pri paco kaj la respondeculoj ankoraŭ ne multajn kontribuojn ricevis. Do, ankoraŭ estos tempo pripensi, redakti kaj sendi ilin. Sed bonvolu fari tuj. Kontribuojn sendu al:
Colette kaj André Weiss, Lotissement Ader,
FR-64250 LOUHOSSOA, Francio.
rete: <andre-colette.weiss@laposte.net>

Krome oni sugestis kelkajn temojn, pri kiuj ankoraŭ estas nek respondeculoj (tio ne estas tro peniga laboro kaj estas tasko, kiun ĉiu SAT-ano devus regi) nek kontribuoj. Pri ili oni instigas la legantojn pripensi, redakti (eventuale kapti, konvinki aŭ logi redaktontojn) kaj kuraĝe sin proponi kiel respektiva respondeculo. Tiuj venontaj temoj povos esti: ekologio, lokaj problemoj, Eŭropa Unio, sindikata aŭ laborista agado, ktp.

La redaktoskipo

## Enkonduko

Saluton. Jen tikla socipolitika dosiero. Ni alfrontu ĝin kuraĝe. Kuraĝe, ĉar kaj naciaj apartiĝemoj kaj kontraŭaj sintenoj ĉiam kaŭzis polemikojn kaj foje eĉ militojn. Kuraĝe, ĉar SAT estas plurtendenca organizo kaj oni rajtas ĉi tie montri ne nur diversajn sintenojn, sed foje eĉ kontraŭajn. Sed oni klopodu alproksimiĝi al la diversaj sintenoj per kleriga, malferma spirito, eĉ se tiuj ne kongruas kun la propraj opinioj.

La situacioj en diversaj tutmondaj lokoj diferencegas. Ne eblas en eta gazeto (eĉ en dika libro) priskribi detale kaj precize la staton ĉie en la mondo. Krom tio, oni klopodu prezenti plurajn rigardojn al la temo. Tiele ni havu mozaikon anstataŭ doktrinon de iu ideologia komitato.

La komenco de tiu dosiero estis ambaŭ debatoj en nia reta forumo respektive pri Kosovo unue kaj pri Tibeto poste. Sed klare tiuj ne estas la ununuraj similaj kazoj en la mondo. Do, ni enmetis en la dosieron elplukaĵojn de tiuj debatoj, sed ankaŭ elplukaĵon el Vikipedio, intervjuon kaj rektajn artikolojn rilate ĉu al preciza kazo ĉu al la ĝenerala problemaro.

Kiel ĉiam, ni havu malferman dosieron. Unuflanke, ĉar mi klopodis havigi kolektivan kontribuon danke al partopreno de ju pli multaj kontribuantoj des pli bone. Duaflanke, ĉar tiu temo ne finiĝos ĉi tie. Kiel okazis ĉe pasintaj dosieroj, reagoj, daŭrigoj, ktp., estos bonvenaj.

Resume, ek, ĝuu la legadon, interesiĝu pri la temo, informiĝu pli kaj plue, ĉi tie kaj alie, kaj klopodu ne serĉi ĉi tie bonulojn kaj malbonulojn. Tio okazas nur en malbonkvalitaj holivudaj filmoj.

Kani

**Bonvolu regule kontribui al la diversaj dosieroj kaj per informoj pri okazaĵoj el via regiono.**
**La redaktantoj de Sennaciulo estas vi mem.**

Sennaciulo
OFICIALA ORGANO DE S.A.T
Asocia sidejo de S.A.T., administrejo kaj redaktejo: 67, avenue Gambetta, FR-75020 Paris, tel. +33.1.47.97.87.05; telekopiilo: +33.1.47.97.71.90. Free: +33.9.50.71.01.97; Retadreso: satesperanto@free.fr.; TTT-paĝoj: http://www.satesperanto.org.; Poŝtkonto: SAT n° 1234-22 K, Paris.
IBAN : FR41 2004 1000 0101 2342 2K02 064
BIC: PSSTFRPPPAR
Konto de SAT ĉe UEA : satx-s
**Plenum-Komitato de SAT** :
Prezidanto : Jakvo Schram
Ĝenerala Sekretario : Krešimir Barković
Kasistino : Thérèse Sabatier
Membroj: Jacques Bannier, Guy Cavalier, Gérard Lieblang, Vinko Markovo, Arturo Prent.

**Redakta Komitato** - Tonyo Del Barrio, Djémil Kessous, Petro Levi, Gérard Lieblang, Vinko Markovo, Vito Markovo, Nikolao Gudskov, Gary Mickle, Jacques Schram, José Salguero - Kani. Provizora ĉefredaktoro kaj enpaĝigisto: Krešimir Barković. Ekspedejo de Sennaciulo: adreso de la redaktejo.
Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn oni ne resendas. La limdato de ricevo de manuskriptoj estas la 10-a de kuranta monato.

9 771163 044279

❒

Imprimé par : TROISA, 4 rue Théodule Ribot, FR-75017 Paris. Aperas monate - Mensuel. Le directeur de la Publication: Jacques BANNIER; Abonnement annuel/jara abono France 55 €.
Autres pays/aliaj landoj : peti la tarifon de nia peranto aŭ de la SAT-Centro.
Dépot légal à la date de parution. N° CPPAP 0510 G 86567